

La unua virino, kiu vizitis kosmon, vizitis nian ĉefurbon
VALENTINA TEREŠKOVA

La 16-an de junio 1963 fariĝis Valentina Tereškova la plej populara virino en la tuta mondo. Tiutage matene startis Valentina en kosma ŝipo Vostok 6 al vojo longa pli ol 2 milionojn da kilometroj. 48-foje ŝi ĉirkaŭflugis nian terglobon kaj post du tagoj ŝi surteriĝis proksime de Karaganda /UdSSR/. Milionoj da fotografioj de Valentina disflugis en la mondon; "La unua virino en kosmo", tiuj estis titoloj de multegaj gazetartikoloj, de televidprogramoj, de radiodisaŭdigoj. Multaj el ni poyis direkte el kosmo aŭdi sian voĉon, voĉon de kuraĝa kaj ĉarma virino, kiu en siaj 26 jaroj fariĝis la plej fama kaj la plej konata virino de la tuta monda historio.

La unua vojo post ŝia surterigo el kosmo gvidis ŝin al Moskvo kaj la unua ĉefurbo, kiu povis ŝin bonvenigi en eksterlando estis Praha. Same kiel la unuan kosmonaŭton Jurij Gagarin eĉ la unuan kosmonaŭtinon Valentina Tereškova bonvenigis nia ĉefurbo per floroj kaj per multegaj ĉirkaŭprenoj de tiuj feliĉuloj, kiuj el popolamasoj sukcesis alproksimiĝi al Valja, heroino de la 20-a jarcento.

S. H.

2

KIEL RESPONDON AL LA 2-a/63 n-ro DE NIA "IB" RICEVIS NIA REDAKCIO LETERON EL
VJETNAMIO, KIUN NI REPRESAS:

VJETNAMA DEMOKRATIA RESPUBLIKO

Sendependeco-Libereco-Feliĉo

Vjetnama Pacdefenda Esperantista Asocio

Hanoi, la 8-an de aŭgusto

1963

Estimataj kaj karaj kamaradoj!

Ni estas tre kortuŝitaj pro via afabla kaj frateca kaj dediĉi al Vjetnamio la ĉi-jaran Majan numeron de via BULTENO, en kiu vi iniciate represis la tutan enhavon de la Nefermita letero de VPEA rilate la agresivan militon instigitan de usona imperiismo en Sud-Vjetnamio kaj aliajn materialojn celantajn subteni pozitive la justan batalon de la vjetnama popolo por reunuigi sian patrolandon.

Unu ekzemplero de via Maja BULTENO partoprenis la 20-julian ekspozicion en Hanojo, aliaj estas disdonitaj al gesamideanoj prizorgantaj la movadon tra nia lando. Vjetnama Rgadio-stacio antaŭ du semajnoj dissendis in- formon pri la aktiva subteno de ĉeĥoslovakaj geesperantistoj al nia popolo. Speciale emociitaj pro via nobla ago, kiu konkretigas la nerompeblan kaj eternan amikecon inter ambaŭlandaj popoloj kaj esperantistaroj ĉeĥoslovaka kaj vjetnama, ni elkore esprimas tie ĉi plej varmajn kaj profundajn dan- kojn de ĉiuj vjetnamaj geesperantistoj.

Vivu la vjetnama-ĉeĥoslovaka amikeco!

Vivu la solidareco de la socialisma tendaro!

Vivu la kompleta liberigo de la popoloj!

Vivu la mondpaco!

Por Centra Komitato de VPEA Ĝenerala sekretario Dao anh Kha, p.m.

2

FINKANTIS LA POET'...

La 19-an de januaro 1877 naskiĝis en urbeto Sobotka en la familio de impostoficisto la dua filo Francisko. La 1-an de julio 1952 li mortis. 75 jarojn vivis nacia artisto Fráňa Šrámek, verkisto kaj poeto, kiu donis al nia popolo verkojn neforgeseblajn. Eĉ sia verko li eternigis sian naskiĝregionon / poemoj: "Sobotka", "Luno sur la urboplaco", "La tombejo de Sobotka", "La ventmuelejo", "Mi konas unu belan kastelon" ktp./.

La tuta verko, poeta de Fráňa Šrámek estas preskaŭ poezia geografio de la Sobotka-regiono kaj el lia verko ĉerpis komponistoj kiel E. Axman kaj eĉ fama J. B. Foerster.

Nia "IB" prezentas hodiaŭ poemon, ĝis nun nepublikigitan. Ĝia aŭtoro A. Rečka verkis ĝin en la mortotago de Fráňa Šrámek kaj s-ano Jiří Kořínek ĝin esperantiĝis. Al nia legantaro ni prezentas la

originalon kaj la tradu-

kon. Tiu, kiu konas la verkon de Fráňa Šrámek, trovos en la poemo "In memoriam de F.S." multajn titolojn de liaj verkaĵoj.

La verko de Fráňa Šrámek apartenas al ĉeĥoslovaka kultura trezoro kaj per tiu ĉi poemo ni rememoras grandan ĉeĥan poeton.

3

Estas eventoj, kiuj falas en fragilan ĝardenon de homa koro kiel fajra ŝtonego fluganta el kosmo.

Kiel la koro ekstrema super la amata poeto... kiel ĝi plorĝemas, kiam manon lian morto haltigis.

EMBARGO je armiloj - historio skribita - pioĉo - peniketo - historio

neskribita -1100-a datreveno - eksterlanda vizito de ekspozicio, kiu ankoraŭ ne estis inaŭgurita kaj demando al la legantoj de "IB"

Seŝajnas al vi nia superskribo iom ĥaosa, ni certigas vin, ke la enhavo de nia artikolo klarigos al vi ĉion /rimarko de la redakcio/.

Hazarde ni ricevis kopion de historia dokumento, nomata "Embargo el Thionsville" /el la jaro 805 de n.e./ kaj en ĝi ni legosciigis, ke oni speciale malpermesas vendadi armilojn al Slavoj kaj Avaroj.

Ion similan ni legosciigis en alia dokumento, pli nova je ses jaroj /el la jaro 811 de n.e./ en tiel nomata "Bonna kapitulato". En ĝi oni memorandas al episkopoj, abatoj kaj al pastroj, ke ili ne darfis vendadi aŭ donacadi armilojn al fremdul-

oj.

La aŭtoroj de ambaŭ tiuj ĉi dokumentoj havis verŝajne drastan motivon, kiam ili proklamis tiun ĉi laŭliteran embargon je armiloj, kaj ni, ĉar ni estas scivolemaj, ni volas iomete pri tiu ĉi motivo konatiĝi. Vere estis jam multaj antaŭ ni, sed ili limiĝis nur je "litera skripta" kaj je kolektado de legendoj kaj nur malmultaj el ili kontentigis kun la rezulto, kiu konstatis, ke "ie" en la koro de meza Eŭropo estis komence de la 11-a jarcento lokigitaj fundamentoj de granda regno, kies geografia amplekso ankoraŭ ne estis konata, sed kiu estis plej verŝajne tre potenca, kvankam ni ankoraŭ iujn materiajn argumentojn pri tio ne havas.

Certe, ke „ne senkiale, la heredintoj de la ruiniginta Homa imperiumo trumpetis alarmon.

Dokumentojn pri tio prezentas al ni arkeologoj.

Kelkaj hazardaj malkovroj kompare kun legendoj, sistema esplorado, kaj preskaŭ tranokte, fariĝis ĝis tiam en- tute nekonata civito Mikulčice ĉe la malsupra fluo de la rivero Morava, mondkonata.

Nek la plej grandaj opti- mistoj atendis tiel riĉajn kaj signifohavajn trovĵojn.

La plej unue malkovrita tombo kaŝis en si krom ostaj restaĵoj arĝentajn orelringojn kaj du koljuvelojn. Iom post iom estis malkovritaj pluaj 1479 tomboj kaj en ili, krom skeletoj, ĉirkaŭ 5000 da objektoj /vazoj, glavoj, lancoj, hakiloj, tranciloj, juveloj ktp/. Sed pli gravega estis malkovro de Fundamentoj de eklezia konstruaĵo preĝejeta. Sed kion diri, kiam pluaj elterigaĵoj malkaŝis ankoraŭ 8 similajn preĝejfundamentojn krome aliaj fundamentoj de loĝejoj. Nun estis jam al ĉiu klara, ke la legendoj, en kiuj oni parolas pri Granda Moravio, ne troigis, kaj ni diru, ke tio ĉi sufiĉas, por ke ni allasu, ke la du dokumentoj, komence menciitaj, ne estis eldonitaj senkaŭze. En okcidenta Eŭropo ekestis antaŭtimo, ke nove formiĝanta regno povus fariĝi grava potencregna rivalo, kaj kiam kelkaj militatakoj finiĝis sensukcese, pruvis eklezio superregi ĝin. En regionon de Granda Moravio venadis monaĥoj, religiuloj ktp., kelkaj el ili spontane, sed la plejmulto da ili estis fakte reprezentantoj de imperiaj ideoj kaj ne de la ideoj vere kristanecaj.

Sed la grandmoravia regno ekkonis intencon kaj danĝeron el ĝi minacancan, pro tio ĝi turnis sin al Oriento, al Bizanco. De tie poste venis misio, akompanata de mesaĝo de bizanca imperiestro: „...mi sendas al vi la donacon pli grandan kaj pli honoran ol ĉiu oro kaj arĝento kaj ĉiu efemera riĉaĵo..."

Alveno de la bizanca misio - Cirilo kaj Metodjo - estas okazintaĵo, kies signifo ne estas nur eklezio.

Ke pli malgranda estas ĝia signifo politika, kaj por plua disvolvo de slava kulturo ĝi havas

eksterordinaran signifon en kompilo de literoj por slava lingvo. Per tiuj ĉi literoj estis skribitaj unue ekleziaj tradukaĵoj, pli poste eĉ juraj verkaĵoj.

Se la skribaj dokumentoj, kiuj estis konservitaj el epoko de la cirilo-metodia misio kaj el la tempo

sekvinta, argumentas al ni altan kulturan nivelon, tradukan eĉ originalan, ĝi devis ĝis antaŭnelonge kontentigi kun supozoj pri tio, kiom tiaj skribaĵoj estis validaj por la regno kaj la popolo por kiuj ili estis skribitaj. Pri vasteco de la grandmoravia regno estis nur supozoj kaj nur nun la lastaj akiraĵoj de la arkeologia esplorado klarigas al ni, ke atentos nin ankoraŭ multaj surprizoj. En la vasta ĉirkaŭaĵo estas malkovritaj restaĵoj de fortigitaj komunumoj, trovitaj ilaroj atestas pri evoluinteco de metioj. Estis malkovritaj ankoraŭ pluaj fundamentoj de preĝejoj, sed tamen ĝis nun ne estis trovita propra princdigneca loĝloko. 1100 jaroj pasis post la bizancmisia tempo kaj nur nun nia scienca esplorado komencas valorigi ĝian signifon, ĉar kompare kun la siatempaj legendoj ne venis la misio en primitivan landon, sed en la landon kun sufiĉe evoluinta ŝtata formo, kies propra brila materia kulturo havis en la eŭropa kadro specialan karakteron.

La 16-an de aŭgusto 1963 vizitis nian klubon en Praha grupo de gesamideanoj el Anglujo, Francujo kaj Belgujo, revenantaj el la U.K. en Sofio. Ili rakontis al ni, ke dum la vojo tra Brno, dank'al s-ano Fridrich, ili havis okazon ankoraŭ antaŭ inaŭguro viziti la preparatan ekspozicion "Granda Moravio". La gastoj vidis tie originalojn kaj kopiojn de trovaĵoj el regio- noj: Mikulčice, Pohansko ktp., kiuj estas preparitaj por vasta publiko kiel dokumento de glora pasinteco de potenca slava regno, kies limo superis la limon de nuntempa ĈSSR. En la tempo, kiam ni skribas tiujn ĉi liniojn, la ekspozicio estas jam inaŭgurita kaj miloj da vizitantoj havis okazon konatigi ne nur kun la ĝisnunaj rezultoj de la esplorado, sed ankaŭ havi plezuron el beleco de metiistaj produktoj, kiuj antaŭ pli ol 11 jarcentoj forlasis farejojn de niaj antaŭuloj.

Denove ni revenas al la superskribo kaj al la promeso ke en la artikolo ni klarigos ĝian ŝajnigan haoson.

Entute ni plenumis la promeson kaj nun ni havas demandon al la legantoj: ĉu vi volas precize konatigi kun la aferon, pri kiuj ni skribas en la artikolo? Se jes, skribu! Skribu al ni viajn opiniojn, skribu artikolojn, informu nin! Ni volonte represos viajn kontribuojn. Pra-Ru

Ege vi faciligos al ni la laboron, se vi sendados viajn kontribuojn en Esperanto kaj samtempe en la ĉeĥa lingvo. Tiamaniere vi evitos miskomprenon dum la tradukado, precipe en fakaj artikoloj. Ni dankas al vi.

Redakcio

Milda Jakubcová:

JUBILEA JARO 1963

Antaŭ mil-cent jaroj regno Granda Moravio floris,
civilizan evoluon Rostislavo tre favoris.

Eĉ influo fremda ĉesis per Misio el Bizanco:
orienta helpo venis en kultura alianco.

Fratoj du - heroldoj gloraj - fondis ĉe ni kulturbazon
kompilinte skribon slavan. Do ni festas ĉi-okazon.

ĈASISTOJ DE MAMUTOJ KAJ DE BOACOJ

Fine de la pli malnova ŝtonepoko /paleolito/ vivis sur nia Tero homaro, kiu antropologie jam neniel distingigis de la homaro hodiaŭa. Tial ni nomas la tiutempan homon same kiel la homon hodiaŭan, t.e. "homo sapiens" /homo raodia/. Por ke ni povu lin diferencigi de la homo de pli malfruaj periodoj kaj eĉ de la homo hodiaŭa, ni aldonas al lia indiko vorteton "fossilis" aŭ "diuvialis", kion ni en Esperanto esprimas per la Torto "an- taŭepoka".

Tiu ĉi "antaŭepoka homo racia"/homo sapiens fossilis/ estas reprezentata de gromagno-ano /c=k, gn=nj/ laŭ la plej multe disvastigita tipo, malkovrita en la jaro 1868 de esploristo Lartet apud la vilago Cromagnon, proksime de Les Eyzies en Francujo. Postsignojn de cromagno-anaj sidlokoj ni povas trovi en la tuta Eŭropo. En Ĉeĥoslovakio ni konas postsignojn de cromagno-anoj el

Předmostí apud Přerov /homo předmostensis/, el Dolní Věstonice sur la rivero Dyje, el la kavernoj de Mladeč, el Brno, el Praha-Podbaba, el la kaverno Zlatý kůň /Ora ĉevalo/ apud Koněprusy, el la kaverno Dzeravá skala /Trua roko/ apud Plavecký Mikuláš.

Fundamente unuo socie kaj ekonomie estis komence hordo, pri kies sangoparencaj ligoj ni ankoraŭ ne havas certajn imageblecojn. Pli malfrue ĝi estis jam pli perfekte organizita famliaro. La hordo eĉ la famliaro vivis kune kaj kune zorgis pri kaŝejoj kaj vivrimedoj. Vivrimedojn ili havigis al si per kolektado kaj ĉasado; ĉasado estis ofte jam tre evoluita kaj oni uzadis ĉe ĝi ruzaĵojn kaj artifikaĵojn /parforsa ĉaso, kaptado de bestoj en diversajn enfalilojn ktp. /La ĉefa ĉasbesto de Aŭrignacanaĵoj estis grandega mamuto, tial, parolante pri tiuj ĉi ĉasistoj, ni nomas ilin mamut-ĉasistoj. La ĉefa ĉasbesto de magdalénien-anaj ĉasistoj estis boacoj; do ni nomas ilin boac-ĉasistoj. Krom tiuj ĉi bestoj estis ĉasitaj bizonoj, prauroj, ursoj, sovaĝaj ĉevaloj, lupoj, vulpoj, leporoj ktp. Multajn ostojn de ĉiuj tiuj ĉi ĉasbestoj ni grandkvante trovadas en ĉiuj bivakoj de tiamaj ĉasistoj.

Tiuj ĉi ĉasistoj vivis en kolektivoj, tio estis necesa, ĉar unuopulo estis ne nur malforta, sed li estis anaŭ nesufiĉe armita. Hordoj kaj famliaroj estis estrataj de la plej kapablaj anoj kaj ili ofte sanĝiĝis sidlokojn, tion oni faris ĉiam, kiam la ĉirkaŭaĵo de ilia sidloko perdis por ili gravecon kiel ekonomia kaj vivtena bazo. Reciprokaj rilatoj kaj kontaktoj inter unuopaj hordoj kaj famliaroj estis en vastaj teritorioj kaj en maldensaj sidlokoj tute nur hazardaj. Cetere ili ne estis bezonataj, ĉar ĉiu hordo kaj famliaro estis ekonomie tute memstara. Tamen certe ekzistis iuj interrilatoj, ekzemple sur riĉaj trovlokoj de krudaj materialoj /ekz. de fajroŝtono/, en ĉasterenoj kaj tiel plu. Ni havas pruvojn eĉ pri tio, ke jam en tiuj epokoj ekaperis ĉ la unuaj signoj de komerco. El la sama tempo ni havas dokumentojn, ke jam tiam estis konscie kulturitaj profitdonaj vegetaĵoj.

Antaŭepoka homo racia ekkomencis jam tiam submetigi naturon; sed pri tio iam venontfoje.

Laŭ prof. RNDr J. Augusta, portanto de Ordeno de laboro, parafrazigis Lomi Rawen.

INSTRUISTO

VERKISTO

ESPERANTISTO

"... Via heroeco eterne vivos en la koroj de ni ĉiuj kaj en la memoro de tiuj, kiuj venos post ni..."

Fine de la pasinta jaro aperadis en ĉĥoslovaka porjunulara monata gazeto ABC ĉeĥa traduko de esperantlingva verko "La Alaska ŝtafeto" de František Omelka. Tio instigis min rememorigi al vi la aŭtoron.

František Omelka naskiĝis en la jaro 1904 en Staré Město-Uherské Hradiště. Li fariĝis instruisto kaj krome li estis sukcesa kaj fama verkisto. Sian esperantiĝon František Omelka rememoras en aŭtobiografaj informoj, kiuj aperis en angla eldono de "La Alaska ŝtafeto" en la jaro 1952. Tie li skribas jenon:

"La plej granda aventuro de mia propra vivo estis la tago, kiam mi eklernis Esperanton. Tio okazis en la jaro 1952. La bone konata Cseh-instruisto Dolfa Bartošik gvidis la kurson, kiun mi vizitis. Tiam mi kompreneble ne povis scii, kiom pliricigos mian vivon la Internacia lingvo. Juj en la unua jaro de mia esperantigo mi ko- respondis kun Lidia Zamenhof kaj kun aliaj eminentaj esperantistoj." Kaj sur la alia loko skribas František Omelka:

"Multajn bonajn amikojn donis al mi Esperanto. Kiel ne rememori ĉi tie precipe du kanadajn amikojn W.H. Fenton kaj Jack Scrivener, kiuj donis al mi tre valorajn informojn antaŭ ol mi komencis verki "La Ŝtafeton".

La plej ĉefa kaj plej konata verko de František Omelka, "La Alaska ŝtafeto", aperis en ĉeĥa, germana, bulgara, islanda, friga kaj nederlanda lingvoj. Krom tiu ĉi verko František Omelka aperigis multajn rakontaĵojn en an- taŭmilita "Heroldo" preparis Esperanto-prelegojn por ĉeĥoslovakaj radiostacioj, verkis libreton por infanoj "Aventuro de Antonio" kaj "Kaptitoj de la glacirokoj" ktp.

František Omelka preferis aventur- ajn motivojn kaj ĉiam klopodis per aventuraj verkoj samtempe eduki al solidareco, kamaradeco, audaco, sinofer- emo kaj al aliaj similaj ecoj. Li uzis nur tiajn terojn, kiujn donis la vivo mem.

La 23-an de junio, antaŭ tri jaroj, František Omelka mortis. En lia personeco perdis la Esperanto-movado edifan preleginton, gvidanton de multaj Esperanto-kursoj, prezidanton de kelkaj Esperanto-kluboj, bonan verkiston kaj homon, kiu estis ĉiam instigoplena laborinto por venko de la Internacia lingvo.

-PRA-

9

ŜI ESTIS ĈARMA KAJ NOBLA – PAROLIS MILDE AL ĈIUJ

el Ĉeĥoslovakio

Dagmar - Markéta./1186-1213/ dana reĝino, filino de ĉeĥa reĝo Přemysl Otakar I-a kaj Adléta /Adelheid/ el Meisen, edzinigita je dana reĝo Valdemar II-a /Sejr-venkanto/.

Markéta, kiel oni origine Dagmar nomis, estis filino de ĉeĥa reĝo Přemysl Otakar I-a, unu el lastaj Přemys- lidoj, kiu en la jaro 1212 akiris por Bohemio heredan titolon de reĝlando. Oni ne scias precize kio kaŭzis la transnomigon de Markéta je Dagmar. Versimile tiel okazis trans la nomo Drahomíra /Dragomira/, kutima ĉe la slava gento de Stodoranoj.

En la jaro 1198 Přemysl nuligis sian edziĝon kun Adléta kaj ŝi kun siaj infanoj foriris al sia frato Dětrich /Diettrich/, markgrafo de Mesen. En la jaro 1204 vizitis ŝin senditoj de dana reĝo Valdemar II-a, sinjoroj Strange Ebsen, la juna Limbek, Oluf Lykke, episkopo Petro kaj Albert el Eskidson kun la mesaĝpeto pri mano de Markéta, kies ĉarmon kaj noblecon de koro prikantadis minesengroj eĉ en dana lando. En la sama tempo oni traktis pri repaciĝo de Adléta kun Přemysl kaj pri reveno de la reĝino en Pragon.

Ĉu la danaj misisenditoj estis ankaŭ en Bohemio estas malfacile pruvebla. Ni povas tion supozi, ĉar Přemysl Otakar en la dokumento de la j. 1214 deklaras sin parenco de Valdemar kaj kvar jarojn pli frue laŭ la peto de Valdemar sendas helpan ĉeĥan trupon kontraŭ sveda Erik Knudson. La edziĝfestoj de Markéta kun Valdemar okazis en la j. 1205 en konata urbo Lubeck.

Jam dum mallonga sia restado en Danlando akiris la juna reĝino Dagmar grandan estimon kaj amon de la tutá popolo. Pri la entuziasmoj kun kiu estis uzata ŝia nomo atestas plej bone belegaj danaj popolkantoj. Dagmar mortis la 24-an de majo 1213 kaj estis entombigita en Ringsted, kie ŝi ripozas sub tomba monumento kun surskribo Dagmar regina.

En la ĉeĥa literaturo estas plej konataj du verkoj prikantantaj Dagmar. La poemo "Dagmar" de Svatopluk Čech /aperis en la j. 1884 en Květy/ kaj la romano de V. B. Třebízský "La regino Dagmar".

Josef Víték, Mělník

el Danujo

Dana samideano Peder Christensen, dum sia lasta vizito en nia klubo, rememoris la danan regionon, kiu devenis el Bohemujo. Tial ni petis lin, ke li priskribu por "Informa Bulteno" unu el la legendoj, kiujn oni rakontas en Danujo pri la reĝino Dagmar:

"... Bedaŭrinde la reĝino Dagmar ne vivis longe, ŝi mortis en la jajo 1212, kiam la reĝo estis for. Kiam ŝi fariĝis malsana, ŝi sendis kurieron al la reĝo en malproksiman parton de la lando. La reĝo tuj prenis ĉevalon kaj cent soldatoj sekvis lin en la unua parto de la vojo - sed ili ne povis lin sekvi. Balaŭ restis nur 15, kaj kiam li rajdis trans la ponton de rivereto Ribe, li rajdis sola. Tamen li atingis la kastelon nur duonhoron post morto de la reĝino. - Sed la reĝo kaj la korteganinoj genufleksis preĝante, ke - la mortintino revekiĝu momenon por adiaŭi sian edzon. - Kaj vere tio okazis - diras la popolkanto - kaj ŝi parolis mallongan tempon kun la reĝo. Ŝi pardonpetis pro sia vanteco, ke ŝi estis vestinta sin en silkan robon dum la semajnoj. - Tio estis la sola peko, kiun ŝi rememoris. Sed nun si ekaŭdis la ĉielajn sonorilojn, kiuj denove vokis ŝin - kaj ŝi adiaŭis sian edzon ..."

Krom tio sendis al ni Peder Christensen fotografajon, sur kiu estas videbla statuo de la reĝino Dagmar, staranta sur frunto de la ŝipo, kiu portis ŝin al Danujo. Ni dankas al dana amiko por tiu ĉi kontribuo.

JARO 1963 - JARO DE JUNULARO!

La Esperanto-Movado startis sian vivon kiel juneca. Zamenhof estis ankaŭ vera knabo, kiam li komencis okupiĝi pri la ideo. Li estis nur 28-jara, kiam li publikigis sian protekton kaj prenis sur sin la gigantan taskon disvastigi ĝin tra la mondo. La altan lingvan kvaliton de Esperanto kat la ideo de plej pura internaciismo ligita al ĝi inspiris junajn intelektulojn en unu lando post la alia.

Do, jen ni havas la jaron 1963. Ĝi estas la 8-a jaro de ekzisto de TEJO kaj la 25-a jaro de la organizita in-ternacia junulara agado en la Esperanto-Movado. Tiu ĉi taro ne estas ordinara labortago de TEJO: UEA kaj TEJO kune anoncis ĝin kiel JARON de la JUNULARO en la ESPERANTO-MOVADO.

La reorganizo de TEJO kat akcepto de ĝia nova Statuto en 1957, la transformiĝo de nia junulara organizaĵo al sekcio de UEA, la kreo de junularaj delegitoj, la speciale favoraj kotizoj por junularo, la apartaj junularaj kunvenoj dum UK, la Oratoraj konkursoj kaj aliaj aranĝoj por la junularo, la klopodoj parte sukcesaj fondi landajn junularajn sekciojn, la apartaj kongresoj de TEJO, diversaj elstaraj junularaj renkontiĝoj pluraj gazetojn kaj bultenojn eldonataj de la junulara mem - ĉio ĉi kontribuis al disvastiĝo de la Internacia lingvo inter la junularo kat al la fortikiĝo de la junulara Esperanto-Movado.

Kaj la nunaj taskoj de TEJO? Fondi junularajn sekciojn en la landaj asocioj kaj lokaj grupoj, se tiaj ankoraŭ ne ekzistas: organizi apartajn junularajn grupojn, se iel eble regule aperigadi junularajn paĝojn en ĉiuj organoj de la landaj asocioj kaj, laŭ la ebleco, ankaŭ en aliaj gazetoj; dediĉi specialan atenton al la junularaj problemoj ĝenerale en la Esperanto-gazetaro; organizi apartajn junularajn programojn en la lokaj grupoj; okazigi junularajn kunvenojn dum la landaj kongresoj en 1963; organizi oratorajn konkursojn por la junularo dum la landaj kongresoj kun subvencioj al la gajnintoj por partopreno en la Oratora konkurso dum UK en Sofio; pligrandigi la nombron de Junularaj delegitoj de UEA - ĉio kun la fina celo fortikigi la junularan sekcion de UEA kaj sekve, de la Movado ĝenerale.

Plue TEJO prizorgos publikigon de artikoloj kaj informoj pri Esperanto en la internaciaj kaj landaj revuoj kaj aliaj periodaĵoj por la junularo, organizos prelegjn en neesperantstaj junularaj asocioj, universitatoj kaj lernetot; distribuos informan materialon utiligante tiucele ankaŭ la ekzistantajn flugfoliojn de UEA, la bultenojn de IGS kaj la dokumentojn de CED; malfermos novajn kursojn por gejunuloj kat se eble, aperigos kursojn de Esperanto en junularaj periodaĵoj.

La estraro de TEJO prave opinias, ke mankas en Esperanto revuo, kiu estus plene dediĉita al la demandoj in-teresj por junularo. Tial TEJO intencas eldonadi, ek de taro 1964, internacian junularan revuon ne pri Esperanto, sed en Esperanto pri ĉio, kio povas interesi junajn homojn en ĉiuj landoj. La provnumero aperos verŝajne antaŭ la UK en 1963, tiel, ke estos eble kolekti abonojn dum la Kongreso kaj aliaj renkontiĝoj ligitaj al ĝi. Por certigi la eldonadon TEJO decidis krei Fondaĵon, kiun prizorgos C.O. de UEA. Kontribuojn oni povas sendi al la C.O., eventuale pere de la ĉefdelegitoj kaj perantoj.

Ni kredas, ke Jaro de la Junularo en la Espejanto-Movado sukcesos, ni esperas, ke ĉiu plenkreska esperantisto rememorigos al si, ke li/ŝi iam ankaŭ estis juna, kaj ke ĉiu juna esperantisto aktive montros sian eziston. Kaj ĉion ĉi por la rapida progreso de la Esperanto-Movado, kio estas grava por ĉiuj, sed por la Esperantista Junularo -estonto de la movado - havas principan signifon; ĉion ĉi por realigo de nia nobla ideo - humanisma internaciismo.

Laŭ "Esperanto",

n-ro 1/1963

TEJO-KONGRESO 1963

Unu semajnon antaŭ la UK en Sofio, okazis en Bulgario la Kongreso de TEJO. Por la Kongreso estis elektita urbo Vraca, kiu havas 40.000 da loĝantoj kaj situas norde de Sofio apud belega montaro. Neforgeseblecon de tiu ĉi kongresa semjno kaŭzis sincera akcepto de la kongresanoj kaj aranĝo de la urbo por la Kongreso. Ĉie flagoj kaj sloganoj - sur la domoj, en montrofenestroj, unuvorte la tuta urbo estis sub influo de la Kongreso.

Solenan inaŭguron de la Kongreso partoprenis ministro de kulturo Ganev urbestro de urbo Vraca Janĉev, repre-zentantoj de bulgara Komsomolo, de Organizo por kulturaj rilatoj kun eksterlando, de

Monda federacio de la studentoj kaj pluaj reprezentantoj de la komitatoj distrikta kaj urba, kaj multaj aliaj.

Programo de la Kongreso estis tre riĉa, kaj ĉiu povis elekti laŭplaĉe prelegojn, diskutojn, renkontojn, diversajn konkursojn, vizitojn de la entreprenoj en la urbo, ekskursojn ktp. Krome la ŝtataj delegitoj havis kelkajn laborokunsidojn, kie oni pridiskutis situacion de la junulara movado, la rezultojn de laboro en la tempo inter la lasta kaj la nuna Kongreso, kaj kompreneble planojn por la estonteco, kaj gravajn demandojn, kiuj rilatis al la junulara movado.

La impresojn oni povas tre malfacile priskribi. Tion oni devas travivi, ĉar elekto de tiu belega kongresa urbo rava ĉirkaŭaĵo, kongresanoj, programoj, facila interkompreniĝo, la juneco kaj novaj konatoj - tiuj faktoroj postrestis grandan impreson.

Mi estas certa, ke la 19-an TEJO- Kongreson longe rememoros ĉiuj pli ol 500 partoprenintoj kaj mi kredas, ke ĉiuj eĉ ankoraŭ en nombro pli granda, vizitos la 20-an Kongreson de TEJO en Nederlando.

J.O.

SONĜO KAJ REALECO - *aktuala rakontaĵo*

Vendrede noktomeze mi venis hejmen. Mi aranĝis miajn aferojn kaj kiam mi estis kun ĉio preta, la lito logis min. Unua tuŝo de la lito kaj mi sciis nenion plu. Mi estis tiom laca, ke mi tuj ekdormis kaj sonĝis.

Kiel bele estas sonĝi. Mi fermis pardon de mia loĝejo kaj eliris el la domo. Ĝi estis unu el la eksperimentaj konstruaĵoj. Antaŭ la domo brilis mia aŭtomobilo Mercedes 300, kiun mi posttagmeze purigis. Mi eksidis en la aŭtomobilon kaj malrapide ekveturis. Kiam mi veturis tra larĝa belega strato la taĥometro montris 120 kilometrojn pohore. Rekta bonega ŝoseo gvidis min al flugaveno. Ĉi tie mi forlasis mian aŭtomobilon kaj eniris belegan flugavenon konstruaĵon, kie mi aĉetis bileton. Post duonhoro mi jam eniris aviadilon kaj forflugis. Dume mi trarigardis kelkajn ĵurnalojn kaj kompreneble ankaŭ ion manĝis, kaj jam mi eliris el la aviadilo, prenis taksion kaj veturis en la urbon. Mi ne scias en kiu lando kaj en kiu urbo mi estis. Sed ĉie mi facile interkompreniĝis per Esperanto.

Promenante en la rubo, mi eniris ankaŭ belegan grandan salonon, kie iu parolis. Ĝis nun plaĉis al mi ĉio. Mi eksidis malantaŭe kaj surprizis min, ke la parolanto uzas ankaŭ Esperanton. Sed mi tre malbone aŭdis. La ĉeestintoj babilis inter si tiom brue, ke mi preskaŭ nenion komprenis. Kelkfoje mi legis, ke tiel aspektas la te- atraĵ prezentaĵoj en Londono, dum kiuj interbabilado de ĉeestantoj montras ilian bonan amuzon kaj kontenton kun la aktoro.

Ĉu mi estis vere en Londono? Kia surprizo. Mi ekaŭdis, ke la ĉeestantoj interbabilas ĉeĥlingve. Tuj mi foriris, per taksio mi revenis en flughavenon, aĉetis bileton kaj tuj mi forflugis hejmen. Uzinte denove mian aŭtomobilon Mercedes, mi rapide tra la konata strato, kiu jam ne ŝajnis tiom larĝa, al mia loĝejo. Pro granda rapideco mi malfrue ekvidis transversan foson sur la strato. Malgraŭ tio, ke mia bona aŭtomobilo malhelpis karambojn, mi sentis balanceton - kaj mi vekigis.

Tuj mi pensis gri la sonĝo. Mi scias, ke preskaŭ ĉiu sonĝo rilatas al io, kion ni travivis, legis aŭ vidis. Longe mi rememoris. Mi estis scivolema pri kio rakontis tiu parolinto. Mi rememoris, ke dum lia parolado la ĉeestintoj tiom interbabilis, ke mi ne povis aŭdi, kion li diris. Jes, antaŭ ol mi ekdormis, mi estis en la esperantista klubo en Praha. Mi esperas, ke mia venonta sonĝo, post la rveno el tiu ĉi klubo, finiĝos pli agrable. Kun tiu ĉi penso mi turniĝis kaj daŭrigis la dormadon.

J.O.

12

Nian klubejon vizitadas multaj eksterlandaj gesamideanoj. Ni petis kelkajn, ke ili diru por "NIA MIKROFONO" ion pri siaj impresoj:

Samideano R. TORRIENTE el Kubo:

"Kiam mi antaŭ jaroj estis la unuan fojon gasto de via klubo, mi forportis el Praha la plej bonajn rememorojn. Ĉi-foje mi estas survoje al Phonjang /Koreo/ kaj mi eluzas eblecon denove veni en vian rondon. Vi tre amike bonvenigis min kaj demandis min kiel ni nun vivas en nia libera

respubliko. La respondo devus esti longa prelego, se mi volus informi vin pri ĉio, kio okazis ek de tiuj tagoj, kiam Fidel Castro kaj liaj kunuloj alportis al Kubo liberecon. Nia liberigita lando bezonis helpon kaj ĝin ni ricevis el socialismaj eŭropaj landoj, precipe el via lando kaj el UdSSR. En Kubo ne estas multaj esperantistoj, la kialo estas tia, ke ĝis la Castro-revolucio la plejparto de kubanoj estis analfabetoj. Sed sufiĉis tri- kvar jaroj kaj la situacio tute ŝanĝiĝis. Ĝis fino de la 1963 ne plu ekzistos en Kubo analfabetoj kaj ni, nur kelkaj esperantistoj, kalkulas ke eĉ la Esperanto-movado elkreskos, ĉar ĝi ebligas al ni novajn kontaktojn kvin amikoj ne nur en socialismaj landoj, sed ankaŭ en tiuj landoj, kies registaroj estas nuntempe kontraŭ la nova reĝimo en Kubo. Eĉ via klubo povas helpi al ni. Sendadu al ni vian belan "Informan Bultenon" kaj informadu vizitontojn de via klubo pri nia vivo en novaj cirkonstancoj. Por via helpo restos miaj samlandanoj ĉiam dankemaj."

Samideanino Ludmila van SOMBEEK el Usono diris al ni:

"Mi ne estas la unuan fojon en via lando, ĉar mi naskiĝis ĉi tie kaj mi mian patrujon jam kelkfoje vizitadis. Ĉiam mi renkontiĝis kun miaj geamikoj kaj kompreneble anaŭ kun geesperantistoj. Mi rememoras la belegan konferencon en Otrokovice /1955/. En tiu ĉi jaro mi estis akceptita de via tiam prezidento Antonín Zápotocký, kiu tiam diris al mi: „Kiam vi venontfoje vizitos Ĉeĥoslovakion, vi ekvidos, kion ni faris por ĝia ekfloro.“ Kaj hodiaŭ mi devas konstati, ke li tiam pravis. Kvankam mi tiam ne dubis pri liaj vortoj, mi nun vidis, ke Ĉeĥoslovakio ekestis lando de ĉiuflanka florstato. Private faris al mi grandan ĝojon, kiam mi estis invitita por ĉeesti la prezentadon de "Vendita fianĉino" de Bedřich Smetana en Nacia teatro en Praha. Ambaŭflanke de mi sidis miaj amikoj Věra kaj Miloš kaj la komencon de la opero, ...kial nune ni ne ĝoju...= kaj ĝian finon =bona afer'realiĝis..= mi taksis simbolo de via vivo. Mi dankas al ĉiuj miaj amikoj, kiuj montris al mi mian iaman patrujon, kiun mi trovis kiel florantan ĝardenon."

Akademiano samideano FAULHABER el Nederlando diris al ni:

"Post 31 jaroj mi revenis al Ĉeĥoslovakio kaj trovis la urbon Praha tiel same belan, kiel en la tempo pasinta. Mi havas grandan simpatian por la urbo Praha, kie mi per Esperanto konatiĝis kun iu, kiu fariĝis poste mia edzino. Esperanto havas por mi grandan signifon, ĝi donis al mi direktan por mia vivo, ke mi fariĝis utila membro de la Asocio, de la socio, kiu utiligas la lingvon por pacaj celoj de la homaro.

Mi venis en la klubon de esperantistoj en Praha kaj mi trovis kunvenejon, pri kiu la nederlandanoj certe sopiras. Belega moderna kunvenejo, tre agrable aranĝita kaj kune multaj geesperantistoj - tio estas por ni nederlandanoj granda okazaĵo. Mi rakontis pri mia vivo kiel esperantisto, mi ankaŭ legis kelkajn ĉapitrojn el mia nova libro, kaj regis tie ĉi tre agrabla atmosfero. Kiam mi forlasis mian landon, mi tute ne sentas min fremda inter esperantistoj en Praha. La mondo per Esperanto fariĝis tre malgranda, restu la paco inter la homoj, ke ni povu ĝis la fino efektiviĝi la revon de nia Majstro, Doktoro Zamenhof."

El originalaj magnetofonaj surbendigoj preparis por "IB" S.H.

El mia notlibro

Membrino de nia klubo samideanino Zdenka KRÁLOVÁ, kiu partoprenis la 48-an UK en Sofio, diris al ni jenon:

"De post mia esperantigo estis mia granda sopiro viziti Universalan Esperanto-Kongreson. Kaj mia sopiro plenumiĝis. Mi partoprenis la 48-an UK en Sofio. Nia karavano konsistis el malgrandaj grupoj, kiuj en diversaj lokoj envagoniĝis en Baltorientan rapidvagonaron, kiu la 1-an de aŭgusto, ĉirkaŭ la 9-a horo matene ekveturis el stacio Praha. Kvankam estis varmega vetero, tamen regis gaja humoro inter ni, ĉar ni veturis al la Kongreso. En Brno envagoniĝis gvidanto de nia karavano s-ano Kočvara. Li tre bone zorgis pri ni ne nur dum la vojaĝo, sed ankaŭ en Sofio dum la Kongreso. Li havis sufiĉe da zorgoj, ĉar nia karavano estis 35-membra.

La kongreso estis impona. Partoprenis ĝin pli ol 3500 esperantistoj el 45 landoj. Neforgesebla restos por mi inaŭguro de la Kongreso. Tiom da nacioj, kaj ĉiuj interkompreniĝas per la Internacia lingvo. Al ĉiuj mi komprenis, kun ĉiuj mi povis facile paroli.

La programo de la Kongreso estis tiel abunda, ke ne estis eble ĉiujn aranĝojn partopreni. Teatraĵoj, Belarta konkurso, Oratora konkurso, Literatura konkurso – kie ankaŭ ĉeĥoslovaka esperantisto Jiří

Kořinek estis premiita – koncertoj, internaciaj kunvenoj de diversaj fakorganizaĵoj ktp. Interalie mi partoprenis kunvenon de MEM. Tie estis unuvoĉe priklamita la neceso de la tutmonda paco, ĉar nurt en la paco povas la popoloj trankvile kaj fruktodone vivi.

Anaku 60 infanoj, 6-15-jaraj, el 10 landoj kaj 12 nacioj havis sian 8-an Infanan Internacian Kongreseton, ligitan al la UK. Kortuŝa estis momento, kiam la infanoj venis sur podion por saluti la kongreson.

Grandan sukceson havis inter la gekongresanoj monografio pri Božena Němcová, eldonita en Ĉeĥoslovakio por disdoni dum la Kongreso.

La neforgeseblaj tagoj rapide pasis. Okazis multaj renkontiĝoj, el kiuj rezultis multaj internaciaj sinceraj amikecoj, kiuj certe ankaŭ daŭros post la Kongreso.

Forpasis internacia balo, teatroprezentaĵoj, prezentaĵoj de folkloraj grupoj, tuttaga ekskurso kaj venis la lasta tago de la UK, kiam ni kunvenis denove en granda salono de Universiado por adiaŭi. Sed ni, esperantistoj, ne diras adiaŭ, sed „ĝis la revgido!“

Kaj denove mi estas en Praha kun belaj rememoroj el la Kongreso, sed ankaŭ kun nova energio labori por Esperanto-Movado, kiu celas al la paco.“

KLUBA STATISTIKO

Post la kluba kunveno la 23-an de aŭgusto ni estis scivolemaj kiom da gesamideanoj en jaro 1903 jam vizitis nian klubon kaj la rezulton ni komparis kun la tutjara statistiko 1962.

Vizitantoj el	1963 ĝis 23/8	1962
E-klubo Praha	1395	1376
E-gastoj el ĈSSR	148	168
Ĉeĥoslovakio	1543	1544
Anglujo	8	4
Belgujo	16	-
Bulgario	6	7
Danujo	2	4
Finnlando	1	1
Francujo	16	-
Germana DR	3	2
Hungarujo	-	4
Jugoslavio	-	2
Kubo	1	-
Nederlando	10	7
Polland	2	22
Svedujo	1	4
Usono	2	-
eksterlando	68	57
Entute	1611	1601

Meznombre vizitadis en 1963 niajn klubajn kunvenojn 43 de geklubanoj /en 1962 nur 27/.

Kvankam tiu ĉi malgranda statistiko povas nin nur ĝojigi, tamen restas kelkaj demandoj: Kial ne vizitadas niajn regulajn kunvenojn ĉiuj geklubanoj? Ĉu al ili sufiĉas, ke ili pagis kotizon? Tio ne rajtigas ilin tari flanke, ĉar la klubo bezonas de ĉiuj aktivan kunlaboron.

Tial ne forgesu: Ĉiuvendrede ek de la 20-a horo okazadas regulaj kunvenj de ESPERANTISTA KLUBO EN PRAHA, Praha 1, Řeznická strato 17.

EMOCIIGA LETERO

14

Nunjare pasis 25 jaroj de la antaŭludo al la dua mondmilito. Ĉeĥoslovaka respubliko per sia rapida mobilizacio malebligis laŭplanan efektivigon de "Fall Grün". Tiel nomiĝis plano de Hitler pri la atako kaj detruo de Ĉeĥoslovakio.

La tuta pacama mondo ataris ĉe flanko de Ĉeĥoslovakio. Esperantistoj el la tuta mondo rapidis montri al ni siajn simpatiojn. Jen teksto de unu el tiaj leteroj. Sendis ĝin nuna membro de Akademio de Esperanto, malnova amiko de Ĉeĥoslovakio, Mag. Sigismundo P r a g a n o:

Londono

27.9.1938

Karaj samideanoj!

En ĉi tiuj minacaj horoj de maljusteco kaj perforto, mi deziras esprimi al vi ĉiuj mian plenan simpatian, kaj mi esperas, ke tiam, kiam vi ekscios pri mia saluto - espereble en a vendreda kunveno - via lando ne estos invadita kaj la vorto PACO, kiun ni ĉiuj tiom amas, ne estos ekzilita el la vortaro de la ĉiutaga uzo! Tiel estu! Salutas vin, la ofte pri vi pensanta

S. Pragano

Kiel efikis tiuj vortoj ne necesas rakonti. Ni sentis, ke ni ne estas forlasitaj. Tiaj leteroj helpis al ni konservi la esperon pri la reveno de paco kaj libereco.

Post 25 jaroj niajn elkorajn dankojn kaj salutojn al akademiano, sinjoro Mag. Sigismundo Pragano en Amsterdamo.

J. Ŝustr

LABORO LIBERIGAS

Tion ĉiutage legadis malfelĉuloj transirintaj pordegon de la unua kortego en la koncentreja kampo en Terezín. "Malgranda fortikaĵo de Terezín" estis dum la dua mondmilito transirejo de miloj da homoj. La plejmulto el ili estis turmentmortigita, aliaj estis ekzekutitaj.

Jes, tio okazis en la 20-a jarcento kaj beaŭrinde preskaŭ ĉiuj kulpuloj forkuris.

Pasis 18 jaroj. Antaŭ la tribunalo en aŭstria urbo Graz staris unu el la iamaj komandantoj kaj murdistoj el Terezín. La nomon de Stephan Rojko neniam forgesos tiuj, kiuj travivis malliberigejon de Terezín. Ĉu povis la verdikto - ĝismorta vivo en malliberigejo por Rojko - lin kaj ĉiujn ceterajn murdistojn senkulpigi? En proksi-meco de Terezín estas moderna nove konstruita vilaĝo Lidice, apud kiu antaŭ dudek jaroj troviĝis same nomita vilaĝo, kiun ekstermis la sama sistemo, al kiu servis Rojko.

Ni, esperantistoj, servu al alia ideo: Al frateca kunlaboro de ĉiuj popoloj, al eterna mondpaco! nacia entrepreno, Praha, vendejo n-ro 0105, ĉeĥoslovaka kaj fremdlingva literaturoj, Praha 1, Václavské náměstí 42, St. Město 15

INFORMA SERVO PRI LIBROJ EN ESPERANTO

ĈEĤOSLOVAKA ELDONO:

JUĜU MEM! Faktoj pri Ĉeĥoslovakio. /1961/ 110 paĝoj 5,70

ĈEĤOSLOVAKIO EN NOMBROJ /okpaĝa faldfolio/ -40

BULGARA ELDONO:

BULGARIO /281-paga publikaĵo/ 14,—

St. Blagojeva: GEORGI DIMITROV /Biografia skizo - 212 paĝoj/..... 7,50

Ŝpas Rušinov: EN KONKURADO KUN LA TEMPO /168 paĝoj/ 10,50

ĈINA ELDONO:

ĈINA ANTOLOGIO /1949-1959, 412 paĝoj/ 18,40

LA OKCIDENTA CAMBRO /88 paĝoj/ 4,-

MI VOLIS VIZITI LERNEJON /76 paĝoj/ 2,50

PEJZAGOJ DE CINIO /ilustrita publikaĵo/ 9,-

POR NOVA AFERO NOVA MANIERO /rakotaĵoj de ĉinaj aŭtoroj/ 3,70

RAKONTOJ PRI FANTOM-SPITANTOJ /98 paĝoj/ 4,50

FLOROJ KAJ BIRDOJ /8 koloraj hildkartoj kun esp.teksto/ 3,-

PITORESKAĴOJ DE PEKINO /12 koloraj hildkartoj/ 3,-

HUNGARA ELDONO:

Pechan A.: HUNGARA-ESPERANTA VORTARO /560 paĝoj/ 17,65

POLLANDA ELDONO:

Baghy J.: KOI;OROJ /novelaro - 106 paĝoj/..... 16,50

Dobr.zynski R.: LA NIGRA KOKINO. MIKI /du rakontajoj por infanoj/ ..	2,60
Dratwer A.k I.s POLAJ-ESPERANTAJ KONVERSACIQJ /247 paĝoj/.....	10,80
Dreher L.s SUPERA KURSO DE ESPERANTO /71 paĝoj/	4,50
POLLANDO /Geografio, his tor io, kulturo .mallongaj informoj/.....	23,—
Wójcikiewicz Zd.: EL LA VOJAGO TRA EUROPO /kun fotografiaĵoj/	21,50
Zioikowska M.: DOKTORO ESPERANTO	18,—
VJETNAMA ELDONO:	
ANEKDOTOJ PRI LA VIVO DE PREZIDANTO HO QHI MINII /130 paĝoj/.....	2,40
DJEN BJEN EU /rakonto - Tran Do - 90 paĝoj/	2,50
FRANJO TU HAU /Bui Duc Ai - 192 paĝoj/ x.....	3,50
LA AVENTUROJ DE ZEMEN /To Hoai - paĝoj/ .x.....	3,-
LA DEMOKRATIA RESPUBLIKO DE VJETNAMIO /179 paĝoj/	2,50
LA GEEDZOJ APU /To Hoai - 188 paĝoj/	5,50
LA KAMPANJO KAO LANG /Nguyen Huy Tuong - 117 paĝoj/..... ;	1,50
MEMORAĴOJ PRI HO CHI MINH /250 paĝoj/	5,50
MONTO DE L'VIRINO /95 paĝoj/	1,50
NIA HEROA POPOLO /rakonto pri la revolucia vivo de la pogolgviantoj kaj batalantoj de Vjetngmio - 265 paĝoj/....	5,-
PRO UNU BOVINO /elektitaj rakontoj - 264 paĝoj/	5,-
SENELIREJO /romano - Nguyen Kong Hoan - 278 paĝoj/	5,-
SUDE DE LA 17-a PARALELO /Quang Loi - 117 paĝoj/	2,-

APERADO DE LA NOVA GAZETO

Esperantista junularo estas jam 25 jarojn organizita. Dum tiuj ĉi 25 jaroj aperadis multaj porjunularaj gazetoj aŭ almenaŭ porjunularaj anguletoj en diversaj gazetoj.

Nuntempe la junulara movado tiom fortiĝis, ke TEJO decidis, ke ek de la jaro 1964 aperadu nova gazeto por gejunuloj. Pruvnumero de "Kontakto"/tiel la gazeto nomiĝas/ aperis jam dum la UK en Sofio. La enhavo de la gazeto ne estas dediĉita al Esperanto, sed estas en Esperanto skribita.

"Kontakto" enhavas diversaj artikolojn je temoj, kiuj interesos ĉiujn gejunulojn en la mondo. Ĝi aperados kvarfoje dum la jaro, kaj la jarabono estas 8 ned. guld. aŭ egalvaloro.

Formato de la gazeto estas la sama kiel de "Esperanto-Revuo". Abono de la gazeto "Kontakto" estas rekomendinda.

J.O.

SCIIGO EL BOJKOVICE

La 2-an de junio estis en Bojkovice inaŭgurita Esperanto - ekspozicio, kiu daŭris 14 tagojn. Vizitis ĝin pli ol 400 homoj, kiuj forprenis neforgeseblajn impresojn. Ĉi tiun ekspozicion aranĝis uzina klubo de Závody Říjnové revoluce, Bojkovice, en kunlaboro kun samideano Jan Tichon.

Tiun ĉi ekspozicion salutis letere ankaŭ s-ano Julio Baghy el Budapesto. La ekspozicion inaŭguris Jaroslav Ševčík, estro de kultura komisiono de Nacia komitato en Bojkovice, kiu poste transdonis la vorton al s-ano Jan Tichoň, kiu prelegis, ĉeĥlingve pri Esperanto kaj ĝia aŭtoro. Poste sekvis trarigardo de ekspozicio kaj la ĉe- estintoj esprimis al tiu ĉi ekspozicio multajn aprobojn.

KORESPONDANTO

ĈEĤOSL0VAKIO:

= ČERNÝ Václav, šumavská 25, Praha 2, CSSR, gerioza filatelisto, deziras intersangi neuzitajn PM kun la tuta mondo. Li petas nur kompletajn seriojn

=Škrabek Josef, Šafářova 5, Praha 10- Hostivař, CSSR, deziras korespondi pri filmo kaj televido kun la tuta mondo.

G E R M A N I O:

= BASSLER Hartmut, Lessingstr.9, Pirna- Copitz, GDR, 11-jara knabo, deziras korespondi kun la tuta mondo.

I S R A E L O:

= GINZ Ota, nun en Kirjat Jam Beet, Israelo, tre bedaŭras ne povante respondi al amaso da leteroj, per kiuj oni proponas al li interkorespondadon.

JUGOSLAVIO;

= VUKŠINIČ Juraj, Titov Trg 1, Karlovac, Jugoslavio, kolektas PM, esp.-glu- markojn kaj glumarkojn de la tuta mondo kun temoj: TBC, Ruga Kruco, foiroj ktp.

POLLANDO:

= WERESKI Józef, skr.p.158, Lublin 1, Pollando, deziras korespondi pri interesaj problemoj kun junaj homoj.

SOVETUNIO:

Nia redakcio aldonas: Se vi pli ofte volas ricevadi nian "IB", sendadu al ni artikolojn, raportojn, interesajojn ktp. Kvarpaĝan "IB" ni ne volas eldonadi jam el ekonomia vidpunkto kaj por deksepaĝa "IB" ni ne ĉiam havas sufiĉe da materialo. Do skribu ĉiuj por ĉiuj!

E.K.P.

= ESPERANTO - RONDETO "VERDA STELO", 1 20-25-jaraj esperantistoj-komencantoj deziras korespondi kun ĉiuj landoj pri ĉiuj temoj. Skribu al: J. A. KISELEV, Krásnij perenlok 9, Tula 1, USSR.

= TUPIJANC Nikolao Jakobo, str. ŝkolnaja 28, Kislovodsk 48, USSR, kun siaj gelernantoj deziras korespondi.

"INFORMA BULTENO" de fakrondeto de Esperantista klubo en Praha ĉe Obvodní kulturní dům ONV 1, Praha 1. Respondeca: Miloš Rudolf, Aperas laŭbezone. Adreso: "ESPERANTO", poŝtkesto 1108, Praha 1, Ĉeĥoslovakio

